


SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1992:3

*En ĉi tiu numero vi povas legi pri la
bonega jarkongreso de
SEF en Oskarshamn
kaj ĝiaj decidoj;*



*recenzon de la dua
volumo de la Eti-
mologia Vortaro de
Ebbe Vilborg; pri la
nova sveda-espe-
ranta vortaro, kiun
vi povas nun uzi
ankaŭ en kompu-
toro; pri esperantaj
literoj en diversaj*

*komputoroj, kaj ankaŭ priskribon kiel
La Espero estas farata.*

La Espero

Organ för
Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Julio 1992 • 80-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktör: Leif Nordenstorm,
Björknäsvägen 3 C, 961 34 Boden,
tel. 0921 - 123 54

Frågor om prenumeration o.dyl.:
Esperanto-Centro, Brunnsgratan 21,
111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Sättning: Leif Nordenstorm, Per Aarne
Fritzon

Utformning: Omnibus, Tyresö

Tryck: Quintus, Sollentuna 1992

Prenumeration: 135 kr. Gåvoprenume-
ration till utlandet: 75 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften. Postgiro
20 12-3, Esperantoförbundet.

Esperantoförbundet

Adress: Esperanto-Centro,
Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm,
tel. 08 -11 74 34

Öppettider: Vintertid alla vardagar, men
säkrast måndag och torsdag
kl. 11-13 och 17.30-19.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1992:

Direktansluten medlem 135 kr.
Familjemedlem (utan tidning) 60 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 60 kr.
Medlemmar under 30 år är samtidigt
medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund och får dess tidning
Kvinpinto. Om du inte får den, meddela
ditt födelseår till EsperantoCentro.

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B,
Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Telefontid: 1 september-15 maj; torsda-
gar kl. 17-18. Skriftliga beställningar
expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson,
Storgatan 13, 753 31 Uppsala



Redaktanto:

Kelkaj pensoj...

La "esperanto-amikoj de Klarälvsdagen" skribis al mi leteron kun la propono, ke la legantoj de *La Espero* skribu al *Utbildningsradion* (la edukradio) por proponi kurson pri esperanto en radio. Tio estas du bonaj ideoj. La unua bona ideo estas, ke estu kurso, la dua ke la legantoj de *La Espero* skribu. Se multaj skribas, niaj eblecoj kreskos...

K-G Gustafsson en Skövde skribis pri la eblecoj skribi esperantaj literojn per IBM-komputiloj. Tio estas tute ebla per ASCII-kodoj. Ĉiuj komputil-uzantoj observu la artikolon pri la litertipoj en tiu ĉi *La Espero*. Nun la problemoj estas bele solvita.

EC kaj nia ekonomio

Leganto, kiu skribis sur malgranda slipeto - tiaj bedaŭrinde facile perdiĝas, do mi ne retrovas lian nomon - demandis kial Esperanto-Centro troviĝas en Stokholmo, kie la lukostoj estas tiel altaj. Kial ne translokigi ĝin al alia, pli malmultekosta urbo, kie troviĝas helpemaj esperantistoj. La respondo: en Stokholmo troviĝas sufiĉa nombro da helpemaj esperantistoj - necesas dudeko da ili - kiuj kune povas funkciigi Esperanto-Centron. Dankegon al ili! Cetere ejo en la centro de la ĉefurbo estas bona reklamo. Estas ankaŭ pli verŝajne, ke niaj membroj iam havu la ŝancon viziti Esperanto-Centron se ĝi estas en la ĉefurbo, ol se ĝi estus en Boden aŭ Växjö.

Tamen via maltrankvileco pri la lukosto estas komprenebla. Eble la plej bona solvo estas, ke la donacemo de la esperantistoj kresku al almenaŭ la dekonono de la donacemo de libereklezianoj. Aŭ ĉu ni esperantistoj ne havas monon por donaci, ĉar ni tiel multe vojaĝas en Esperantio?

Nia nova vortaro

Sur mia skribotablo kuŝas la nova svedesperanta vortaro. Baldaŭ eble la komputila versio kuŝos en mia komputilo. Nur iom post iom mi komprenas la gravecon de nia nova vortaro. Ĝi estas bela laboro de Ebbe Vilborg kaj multaj aliaj personoj; pri tio atestos la recenzo en la venonta numero de *La Espero*. Mi espe-

ras, ke sekvos vigla debato pri la signifo de diversaj vortoj kaj iliaj ekzaktaj tradukoj. La vortaro certe stimulas la intereson pri esperantologio.

Cetere, ĉiuj viaj leteroj estas bonvenaj. Mi legas ĉiujn, sed ne povas publikigi ĉion. Tamen neniam hezitu skribi!

Sincere via

Leif Nordenstorm

ANONCETOJ

En skrift om EG, mångspråkigheten och esperanto på 39 sidor i A4-format kan beställas genom att 20 kr + 10 kr för porto betalas till Svenska Esperanto-Institutet, postgiro 5 15 11-4.

La ĉi-jara eldono de Pasporta

Servo, la listo de 900 adresoj de homoj, kiuj volas akcepti vojaĝantajn Esperanto-parolantojn. Mendu ĝin de: Sara Török, Stångatan 56, 125 39 Älvsjö, tel: 08-722 92 91.

Anonco en la estona gazeto "La

Komercisto" kostas nur 2 pundojn. Eldonkvanto: 50000 ekz. Informiĝu ĉe: Universaal-Kooperatiiv Aitai, pk 100, EE-203600 Pärnu, Estonio.

Internacia kurso pri turismo kaj

komerco okazos 1 septembro 1992 - 31 majo 1993. Informoj: Monda Turismo, Str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando.

DONACOJ

Je memoro de Martin Säther: Herŝ Holender, Lund 100.

Je memoro de Lars Andersson:

Willy Burgemeister, Åmål 100.

Klubo Cent: Olle Olsson, Lund 100.

K.H. Persson, Motala 100. Åke

Palm, Malmö 100. Harald

Andersson, Hällefors 100. Sennoma

100. Anna Ekbo, Boden 100. Leif

Nordenstorm, Boden 100. C.G.

Ingestedt, Vällingby 300. Hilding

Andersson, Arvika 100.

Klubo Mil: N-ro 6: Gösta Hedlund,

Uppsala 1000; N-ro 7: Carl

Rönnerberg, Västerfärnebo 1000.

Nur laŭdoj

SEF-kongreso 1992. Oskarshamn. Popola Altlernejo. Vendredvespero. En la akceptejo je la 18-a horo jam svarmas alvenintaj esperantistoj. Konatoj kaj nekonatoj. Svedoj, sed ankaŭ estonoj, poloj, rusoj, kazaĥoj kaj alilandanoj. Ĉiuj salutas kaj babiladas kiel esperantistoj kutime faras.

En la akcepteja halo troviĝas televidaparato, kies programo konsistas el surbendigitaj eventoj en Esperantujo kaj krome bildoj, kiuj montras la kongresurbon Oskarshamn.

Kafejo Oskarshamn

La vespera programo komenciĝas en la manĝosalono kaj sur la podio staras LKK-ano Harold Brown. Inter la spektantoj troviĝas invitatitaj ne-esperantistoj el Oskarshamn. Pro tio Kerstin Rohdin intervenos de tempo al tempo por interpreti.

Harold Brown komence serĉas esperantan vorton por *konferencier* kaj volas scii ĉu troviĝas bona vorto en la tute nova sved-esperanta vortaro. (Jes: **prezentisto**, **anoncisto**.) Post tio li komencas prezenti kaj intervui siajn "viktimojn". Kelkaj el ili ne nur respondas al amuzaj demandoj, ili ankaŭ kantas, ludas instrumentojn aŭ rakontas anekdotojn.

Surpodie aperas estonaj virinoj. Unu rakontas pri sia laboro kiel astronomo, alia – instruistino – rakontas amuzan anekdoton kun posta traduko de Kerstin. Kerstin montris eksterordinaran kapablon memori ĉion, kion diris la intervjuitoj. La efiko de tio bedaŭrinde iom tede plilongigis la daŭron de la programo, sed mi esperas, ke la ne-esperantistaj gastoj estis dankemaj.

Kultura evento

Nia kongreso ĉi-foje estis videbla kultura evento. LKK aranĝis artekspozicion, en kiu tri diverslandanoj partoprenas kaj la pentraĵoj migros dum naŭ semajnoj. Nun dum la kongreso la bildoj pendas ĉi tie por la ĝuo de la kongresanaro. La ar-

tistoj ĉeestas, kaj Harold prezentas ilin.

La 37-jara Sergej Bondin loĝas en la urbo Minusinsk en Ruslando, Siberio. Montrigis, ke li bone parolas esperanton, kvankam li ne praktikis pli frue. Li studis tute sola kaj neniam kontaktis aliajn esperantistojn. Pro tio estis interese aŭskulti kiam li recitis du el siaj propraj poemoj. Arto estas neklarigebla, laŭ Sergej, same kiel spuro en la aero post fluganta birdo. La spuro troviĝas, sed okuloj ne povas vidi ĝin.

Vaike Parmsoo el Estonio preferas pentri belajn naturbildojn. Ŝi ne lernis esperanton, sed subtenas la lingvon. Anstataŭ paroli esperanton, ŝi parolas svede.

La tria artisto nun staras sola sur la podio – Harold Brown. Li starigas demandojn al si mem kaj klarigas, ke li pentras por amuzi. Li diras: "Se vi vidas miajn bildojn, kelkaj eble ridigos vin. Do ridu, kaj mi ĝojos. Se iu poste volos aĉeti, mi estos ankoraŭ pli ĝoja."

La invitita gastpreleganto Erich-Dieter Krause ŝerceme respondas al la demandoj. Li laŭdas la svedan naturon kaj precipe la Smolandan, kiu nun montras sian plej belan vizaĝon.

Nataŝa kaj Ĵomart jam fariĝis konataj

por la svedaj esperantistoj, kaj nun ravas la publikon kantante belajn kaj kelkfoje melankoliajn komponaĵojn de Ĵomart. Ilia hejmlando estas Kazaĥio, ne plu Sovetunio.

Harold vokas la SEF-prezidanton kaj demandas pri la vizioj. Roland Lindblom respondas, ke homoj bezonas viziojn, sed prefere realigeblajn. La vizio ĉe UEA nuntempe temas pri la ebleco enkonduki la lingvon en la Eŭropan Komunumon. UEA jam de longe laboras sur tiu kampo. Fine de februaro okazis UEA-simpozio en Ĉeĥoslovakio kun la celo klerigi eŭropajn esperantoaktivulojn. Roland estis unu el 50 partoprenantoj tie.

Plej laste venis humurplena mim-prezento de Jerzy Fornal el Pollando. "Fino bona, ĉio bona", esprimo konvena por la unua kongresa tago. La "kafeja" formo bone funkciis kiel gastprezenta metodo. Do – la vespero fariĝis pli konatiga ol interkona. Vespero en bona etoso.

ILEI-jarkunsido

ILEI kunvenas jam je la horo 08.30 en la sabatmateno. Bertil Andreasson raportas kaj mencias la viziton ĉe la edukministro antaŭ unu jaro. Estis vana klopodo, laŭ Bertil, ĉar la parlamento ŝanĝiĝis post kvar monatoj. La elektoj en septembro ne nur forigis la edukministron, sed la tutan registaron.

ILEI altigas la jarkotizon al 85 kronoj. Oni atentigas pri la ĉi-jara ILEI-kongreso en Bratislavo, kaj pri tio, ke ILEI starigis novan fonduson por helpi membrojn en landoj kun nekonverteblaj valutoj. La gazeto *Juna Amiko* estas transprenita de ILEI, kaj oni admonas ĉiujn aboni ĝin. Tiu admono ampleksas ankaŭ la libron "Tendaraj tagoj".



Parto de la SEJU-estraro. Sidantaj: Åsa Andersson, Kajsa Larsson kaj Camilla Persson. Staranta: Fredrik Olofsson (Fotis: B. Kim-Lindblom)

SEJU-kunsido

Ne multaj gejunuloj venis al la kongreso

en Oskarshamn, sed sufiĉe por jarkunsidadi. La jarkunsidon prezidis Per Aarne Fritzon. La estraro ne multe ŝanĝiĝis. Kajsa Larsson (Stokholmo) restas prezidanto. Restas ankaŭ la estraranoj Malin Söderback (Gotenburgo), Gabriella Sandström (Stokholmo), Camilla Persson (Hallsberg) kaj Keiko Snarberg (Gotenburgo). Novaj estas Fredrik Olofsson el Trollhättan kaj Åsa Andersson el Lund. Kajsa Larsson kun ĉarma rideto klarigis, ke SEJU dum la pasinta jaro kvazaŭ glite velboatis en milda vento pro bona laborotoso en la estraro, sed ke preskaŭ ĉiuj fortoj koncentriĝis ĉirkaŭ la preparoj por la sukcesa Internacia Junulara Kongreso en Karlskoga pasintjare. La estraranoj nun esploras novajn eblecojn por aktivigi sin.

Oni informis pri granda junulara aktiveco en Litovio, kie oni deziras kunlaboron kun SEJU. El Kopenhago venis esprimo de sama intereso.

SEJU planas renkontiĝon en Gotenburgo en la aŭtuno. La tradicia renkontiĝo en Barnens Ö fine de aŭgusto ankaŭ ĉi-jare ne mankos. En la printempo venontjare okazos speciala renkontiĝo por esperanto-infanoj.

Eldona Societo

Prezidanto Tomas Jansson malfermis la jarkunsidon. Prezidanto por la kunsido fariĝis Roland Lindblom. Pro reelektaj okazis rapide. Poste sekvis prelegeto de docento Ebbe Vilborg. Li retrorigardis sian longan vojon al preta manuskripto por nova sved-esperanta vor-




Agento Emanuelsson kaj Roland Lindblom admiras bildon, kiun Tanzania Esperanto-Asocio donacis al siaj svedaj "ĝemeloj". (Fotis: Anita Bergh)

taro kaj komentis pri diversaj problemoj kaj obstakloj survoje al la celo. Li klarigis pri labormetodo, pri geografiaj nomoj kaj pri elekto de tute novaj vortoj.

Ebbe Vilborg faris sian laboron senpage, sed Eldona Societo volis esprimi sian dankemon kaj transdonis novan kaj modernan komputilon al li.

Ebbe Vilborg konscias, ke la nova vortaro ne estas 100-procente senerara, kaj li petas helpon. Se iu trovos eraron aŭ mankon, bonvolu sendi leteron pri tio al Esperanto-Centro.

Franko Luin poste atentigis, ke Eldona vendas la novan vortaron ankaŭ en versio uzebla en Macintosh-komputiloj. Ses disketoj ampleksas la tutan vortaron kaj kostas 600 kronojn.



Ebbe Vilborg, leksikografo. (Fotis: B. Kim-Lindblom)

Inaŭguro

Tradiciaj svedaj melodioj ornamis la komenciĝon en la granda salono. La paro Birgitta kaj Bo Ekvall sidis ĉe la piano. Sur la podio aperis honoraj gastoj: la urbestro Torsten Carlsson, la rektoro de la popolaltlernejo Sven-Ingvar Nilsson, kaj la prezidanto de la ĝemelurba asocio Pärnu-Oskarshamn, Nils-Erik Bärning.

Prezidanto Roland Lindblom dividis sian paroladon en du partojn, unu en esperanto kaj unu en la sveda. Li volis per tio esti ĝentila al kaj la eksterlandaj gastoj kaj al la svedaj gastoj, kaj ankaŭ montri, ke internaciaj kontaktoj ĉiam renkontas lingvoproblemojn.

Urbestro Carlsson bonvenige salutis la esperantistojn kaj atentigis pri la

bela naturo en tiu ĉi parto de la lando. Sven-Ingvar Nilsson kaj Nils-Erik Bärning ambaŭ gratulis la kongreson. Ili ankaŭ esprimis envion, ĉar esperantistoj havas nelimigitajn eblecojn veturi ien ajn en la mondo pere de esperanto.

Estona esperantistino intervenis en la programo kaj kantis neordinare belan kanton el sia lando.

La artisto Sergej Bondin venis kun salutletero de la urbestro en Minusinsk, la siberia hejmurbo de Sergej. La letero estis en la rusa lingvo kaj Sergej legis tradukon.

La inaŭguro finiĝis kaj la urbestro invitis ĉiujn al la manĝosalono, ĉar la urbo Oskarshamn regalis nin per lunĉo.

Jarkunveno de SEF

Prezidanto Roland Lindblom malfermis la kunvenon, kaj oni elektis Sten Svenonius kiel prezidanton por la kunveno. La tagordaj punktoj glitis rapide. La plej multaj elektoj fariĝis reelektaj. Kiel prezidanto reelektiĝis Roland Lindblom. Nova en la estraro fariĝis Per Aarne Fritzon. Li anstataŭis Kerstin Rohdin, kiu decidis forlasi la estraron meze de oficperiodo. Roland esprimis koran kaj varman dankon al Kerstin kaj transdonis dikan libron. Nova anstataŭanto en la estraro fariĝis Agneta Emanuelsson el Katrineholm.

Troviĝis nur du kongresaj proponoj. La estraro proponis kotizaltigon per dek kronoj por plene pagantaj membroj. Tio signifas, ke oni ne altigis por familiaj kaj junaj membroj.

Propono numero du venis el Norrköping. Temas pri la unua SEF-prezidanto Valdemar Langlet kaj lia edzino Nina,

kiuj dum la dua mondmilito heroe agadis por savi deportotajn judojn en Budapeŝto. Ĉi-jare pasis 120 jaroj post la naskiĝo de Valdemar Langlet kaj la klubo proponas festadon de "Tago de Valdemar Langlet", eventuale kunlabore kun la sveda Ruĝa Kruco. La jarkunveno akceptis.

Mondlingvo aŭ kulturperanto?

La unua prelego de Erich-Dieter Krause celis respondi al tiu demando pri esperanto. Laŭ Krause esperanto estas valora kiel kulturperanto. Esperanto ne estas fantazio, sed ekzistanta fakto. Ĝi jam montris sin taŭga rimedo en tia rolo, kaj li atentigis pri la multaj esperantaj aranĝoj en la mondo. Okazis minimume 206 aranĝoj dum la lastaj sep monatoj de 1991. Li emfazis ke komunaj internaciaj agadoj estas la ĝusta vojo por forigi la antaŭjuĝojn kontraŭ esperanto.

Vagabondo

Jerzy Fornal estas konata por la sveda esperantistaro, ĉar li jam plurfoje prezentis teatraĵojn en Svedio. Li estas aktoro ĉe la pola Nacia Teatro en Varsovio, sed ankaŭ prezentas en sia propra esperanto-teatro en la sama urbo. Nun ni vidis lin en premiera prezento de la teatraĵo "Vagabondo"

La monologo de Harold Brown estas animovigla. La lumo ŝetas siluetojn sur la fonon kaj tio faras bonan efekton. En sia sonĝo la vagabondo aperas kiel soldato en iu dezerto kaj la sceno iĝis pli realeca per la siluetoj. Efika aranĝo de la lerta aktoro Jerzy.

Supeo

La estrino de la kuirejo aranĝis bonan kaj abundan supeon kun bongusta deserto ĉe la fino. Post la trankvila atmosfero ĉe la tabloj sekvis io alia. La sata kongresanaro kolektiĝis en la granda salono. Tie troviĝis virino, kiu tuj invitas al leciono de diverslandaj popoldancoj. Multaj sekvas la admonon kaj la ringo de dancemuloj rapide kreskas. La partoprenantoj videble amuziĝis sed ankaŭ ŝvitis.

Tiuj, kiuj ne dancis, rigardis, babilis kaj trinkis kafon. Je la fino de la vespero la duopo ŝomart kaj Nataŝa prezentis mildajn kaj kvietajn kantojn.

Diservo

La popola altlernejo havas propran kapelon, la Cecilia-kapelo. Tie okazis la diservo, aranĝita de KELI. Organistoj estis Bir-

gitta kaj Bo Ekvall. Solkantistino estis Axelina Lindholm akompanata de Thomas Holmér. La predikanto venis el Norvegio, Erling Schau.

Leksikologio de esperanto

La dua prelego de la germana gastpreleganto Erich-Dieter Krause komenciĝis per gratulo pro la eldono de la nova svedesperanta vortaro. Li diris, ke perfekta kaj plena vortaro ne povas aperi, ĉar la lingvo ĉiam ŝanĝiĝas. Novaj vortoj eble disvastiĝas aŭ ne akceptiĝas kaj mortas. Li opini- as, ke ni estu kontentaj, ke esperanto estas

Tanzanio ĉe ni en Oskarshamn!

Dum la SEF-kongreso en Oskarshamn la kongresanoj, dank' al kelkaj niaj membroj, sentis proksimecon al nia "ĝemelo", Tanzania Esperanto-Asocio, malgraŭ la vere granda distanco.

Troviĝis interesa ekspozicio kun bildoj kaj mapoj de la vojaĝo al Tanzanio, kiun faris Anita Bergh, Inger Lannergård kaj Agneta Emanuelsson. Donacoj de Tanzania Esperanto-Asocio ankaŭ vivigis la ekspozicion. Anita Dagmarsdotter kontribuis per granda bildo pri esperantoleciono ĉe la Hinda Oceano. (Tie partoprenis i.a. Bawili Simba el Zairo, kiu nun vivas en Stokholmo kaj partoprenis la kongreson en Oskarshamn!) Ŝi ankaŭ informis pri la unua tanzania landa kongreso, kiu okazos en julio ĉi-jare.

Plurfoje dum la kongreso Anita kaj Agneta prelegis kaj montris lumbildojn de Tanzanio. Estis tre interese vidi la geamikojn de la foralando.

Roland Lindblom invitis reprezentantojn de ĉiuj kluboj interparoli pri tanzaniaj rilatoj. Li proponis, ke ĉiu klubo havu sian ĝemelan klubon. Ĝemelaj rilatoj alproksimigas la landojn, estas ambaŭflanke informriĉaj kaj plilarĝigas la perspektivon.

Kaisa Hansen

fleksebla kompare kun la naciaj lingvoj. Tamen ekzistas diversaj teoriaj problemoj.

Li tuŝis ankaŭ la geografiajn nomojn. Oni nacilingvigas nomojn en aliaj lingvoj kaj ni esperantigas geografiajn nomojn. Poste necesas, ke uzantoj akceptas la nomojn.

Krause esperas, ke ni atingos situacion, kiam esperanto akceptigos kiel normale uzata lingvo sen kontraŭbataloj de etnaj lingvoj. Se homoj kontraŭbatalas esperanton ĉar ili kredas, ke ĝi estas nenatura, ili devus rigardi la oficialan lingvon de Indonezio. Li mem instruas tiun lingvon, kaj li donis plurajn ekzemplojn, kiuj montras grandan similecon kun esperanto en la uzado de afiksoj. En la fino de sia unuhora prelego li rekomendis diversajn kaj bonajn vortarojn por esperantistoj. Li ankaŭ substrekis, ke oni devas sekvi mezan vojon inter la ekstremaj skoloj.

Libroaŭkcio

La libroaŭkcio fariĝis tradicia programero de la kongresoj. La buŝe lerta aŭkciisto Torsten Lund ne nur gvidis la aŭkcion sukcese, sed li ankaŭ aktoras tiel ŝerceme kaj amuze, ke la aŭkcio fariĝas distra programero. La publiko multe ridis, sed plej multe ridegis nia gasto Erich-Dieter Krause.

Fermo de la kongreso

La tritaga kongreso finiĝis kaj kaj ni aŭdis nur laŭdojn pri ĝi. La sespersona LKK faris tre bonan laboron kaj la prezidanto dankis ilin en la nomo de la SEF-estraro. Alia dankesprimo venis de s-ro Pavelson el Estonio. Li dankis en la nomo de la dek invititaj estonoj, kiuj vere ĝuis sian restadon.

Muzea vizito

Multaj kongresanoj kaptis la okazon viziti la muzeon en la urbo, kie troviĝis la famaj lignoskulptaĵoj de "Döderhultarn", t.e. la skulptisto Axel Robert Pettersson, kiu mortis jam en la jaro 1925. D-ro Krause komentis, rigardante la humurplenajn figurojn, ke tio ĉi estas "same interesa kiel esperanto".

Gazetara intereso

Pluraj artikoloj aperis en la regionaj gazetoj kaj ĉiuj pozitivaj por nia afero. Kelkaj artikoloj aperis jam antaŭ la kongreso kaj ili temis pri la ekspozicio, Jerzy Fornal kaj Erich-Dieter Krause.

Boomee Kim-Lindblom

Franko Luin, sudeŭropa importaĵo



(Fotis: J. Milld)

Antaŭ unu jaro, Franko Luin povis – kune kun amaso de geamikoj – festi sian duoncentjariĝon. En Tyresö, Svedio.

Tamen estis ne tie, sed en apud-mediterranea urbo, ke la luina historio komenciĝis. En la itala urbo Triesto, en la jaro 1941, li naskiĝis.

Li tamen estas ne italo, sed sloveno.

Eŭropa historio

Temas pri peco de proksima historio en nia mondparto. Ĝis la paco de Versailles en 1919 ekzistis ja la "Aŭstro-hungara duobla monarkio", kiu entenis plurajn diversajn popolojn, inter alie slovenojn. Ĝia sola, aŭ almenaŭ sola grava, haven-urbo estis Triesto.

Kiam ĉesis ekzisti tiu monarkio, Triesto – kune kun ĝia ĉirkaŭaĵo, la duoninsulo Istrio kaj parto de nuna Slovenio – ekapartenis al Italio, kiu je la komenco de la dua mondmilito ankaŭ okupis plian parton de Slovenio. Post la dua mondmilito Triesto, kvankam ne ĝia ĉirkaŭaĵo, restis itala.

Sed parto de ĝiaj enloĝantoj estas slovenoj. Inter ili Franko Luin.

Ĉu triste en Triesto?

Kial Franko forlasis Trieston? Al tiu demando li respondas, ke ekzistis ne unu, sed pluraj kialoj por lia ekveturo.

Grava kialo estis ligita al lia nacieco/ŝtataneco. Li estis sloveno laŭ nacieco, sed italo laŭ ŝtataneco. Kiam, je la fino de la 50-aj jaroj, alproksimiĝis la tempo de soldatservo, li tute ne emis tion fari. Ne en tiu armeo, kiu persekutadis kaj mortigadis slovenojn nur kelkajn jarojn pli frue. Maniero eviti soldatservon estis iri eksterlanden.

Li ankaŭ jam atingis la aĝon, kiam oni – senkonsidere de pendanta minaco de soldatservaĉo – povas eksenti flugemon, volon "vidi la mondon".

Ĝuste Svedio tiutempe havis fortan bezonon de laboristoj, svedaj entreprenoj eĉ varbis en suda Eŭropo. Krome la svedaj salajroj estis altaj, kompare kun tiuj en militintaj landoj. Pri tio Franko sciis, kaj tial ĝuste Svedio estis alloga alternativo.

Parta kialo – aŭ sekvo – de la franka forvojaĝemo estis ankaŭ esperanto. Do li jam tiutempe estis esperantisto.

Du-ŝtupa afero

Kiamaniere Franko Luin ekverdiĝis?

Laŭ li, esperantistiĝo okazas **du-ŝtupe**. Unue oni ekscias pri la ekzisto de la lingvo, poste oni decidas lerni ĝin.

En la kazo de Franko mem, li unue legis artikolon pri esperanta kongreso en Zagrebo. Kelkajn jarojn pli poste, en 1956 (la 6-an de junio, li precizigas), li vojaĝis al Jugoslavio por aĉeti viandon en apudlima urbo. Tiam li ekvidis esperanto-librojn en monstro-fenestro.

Rezulte de tio li transformiĝis al posedanto de kaj lernolibro por memlernantoj kaj vortaro. Kaj li uzis ilin. Jam post kelkaj monatoj, li kapablis kompreni esperanton kaj mem sin esprimi.

Franko iamaniere kontaktiĝis kun la esperanto-klubo de Triesto kaj fariĝis kunven-partoprenanta membro – la sola junulo (15-jara). Baldaŭ li estis ankaŭ partopreninto de internacia verdulrenkontiĝo en Jugoslavio.

La franka ekintereso pri esperanto verŝajne fontis ĉefe el intereso ĝenerale pri lingvoj. Jam denaske Franko ja parolis du lingvojn – la slovenan kaj la italan. Krom tio en la lernejo li studis la latinan kaj anglan, kaj pli poste iom la francan kaj rusan lingvojn.

Svedien

Al Svedio, kaj pli precize Malmö, Franko Luin alvenis en decembro 1961. Evidentus, ke sur lia retino ankoraŭ – 30 jarojn poste – klare restas la bildo de tiu momento:

– Estis malhele kaj malvarme. Renkontis min du svedaj esperantistoj...

Sur sveda tero Franko bone adaptiĝis, trovis kaj laboron, loĝejon kaj estontan edzinon. Do, li decidis resti ĉi tie.

Ĉar Franko preskaŭ tuj fariĝis grava kontribuanto al la laboro por esperanto en Skanio. Li partoprenis la fondon de junulara klubo en Malmö. Klubu kun vigla aktiveco – ĝi havis studgrupojn kaj por komencantoj kaj por daŭrigantoj.

Plurobla redaktoro

Franko baldaŭ fariĝis redaktoro de la SEJU-revuo, *Kvinpinto*. Dum tiu periodo *Kvinpinto* havis sian oran epokon, kun tralaborita kaj leginda enhavo, kiel neniam antaŭe aŭ poste. La ideo estis povi pritrakti interesajn demandojn, ne timi lasi diversajn voĉojn kaj kontraŭajn opiniojn esti aŭdataj.

Fakte estis duopo, kiu verkis *Kvinpinton*. "Ĉe sia flanko" Franko nome havis la tiaman Ulla Strönne, kiu ĉef-respondecis pri la sveda lingvo – tiurilate Franko ja estis ankoraŭ komencanto.

Dum kelkaj jaroj Franko estis ankaŭ la redaktoro de la internacia esperantorevuo *La Praktiko*.

Krome Franko plujare redaktis nian SEF-an *La Esperon*, kvankam li neniam estis formale elektita ĝia redaktoro! Unue li helpis al la aĝiĝinta Tiberio Morariu (alia valora sudeŭropa importajo al la sveda esperanto-movado!). Post lia eksigo Åke Blomberg fariĝis redaktoro, sed Franko daŭre kunhelpis kaj pli kaj pli transprenis la faktan redaktadon, kiam mankis materialo.

Post kelkaj jaroj li ricevis la honoron esti elektita prezidanto de la *La Espera* redakta komitato. Finfine li tamen enmetis sian nomon en la redaktan kvadraton, nomis sin mem redaktoro...

Cetere

Multo pli povus esti dirita pri Franko Luin, sed la spaco ĉi tie ne permesas. Nur ankoraŭ iom:

En 1967 li kaj Ulla transloĝiĝis al Tyresö. Franko trovis laboron ĉe LM Ericson, sed antaŭ kelkaj jaroj starigis propran firmaon – Omnibus – kun impona ilaro de komputoroj kaj printiloj.

Omnibus produktas reklamon kaj aliajn presotajn materialojn. Pere de ĝi estas nun teknike produktata multa esperanto-materialo, inter alie *La Espero* kaj la libroj de Eldona Societo Esperanto.

Ĉe Omnibus laboras ankaŭ alia persono – Per Aarne Fritzon. Franko:

– Omnibus estas ne-esperanta firmao, kie la laborlingvo estas esperanto – verŝajne la sola en Svedio, kaj unu el malmultaj en la mondo.

Cetere la antaŭe menciita *duopo* estas nun *triopo*. Ekekestis Janko – verdkora akracerbulo, same kiel siaj gepatroj. Sed tio estas jam temo por aparta artikolo.

Ĉi tie nur resumeblas, ke por la sveda esperanto-movado estas feliĉa cirkonstanco, ke iam Franko Luin estis minacata de itala soldatservado.

Jan Milld

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

Volumo 2: E-J

Prezo: **95 SEK**

Mendu ĉe Esperantoförlaget, Box 7502, 200 42 Malmö, poŝtgiro 578-5

Volumo 3: K-M prespreta, aperos en septembro. Volumo 1: A-D ankoraŭ havebla por 86 kronoj. Ĉiuj prezoj inkluzivas varimposton kaj sendkostojn.

FOLIOJ DE MIA MEMORO



**ANKORAŬ
HAVEBLA!**

*Jomart kaj Nataŝa
en 45 minutoj
da ĝuinda muziko*

86 SEK

(inkluzivas sendkostojn).

Mendu ĉe
Eldona Societo Esperanto, Box 7502,
20042 Malmö. Poŝtgiro 578-5


De manuskripto al paĝo

Kiel leganto aŭ/kaj kunlaboranto de *La Espero* vi eble iam demandis al vi, ĝuste kiel okazas la teknika produktado de nia gazeto? Kio okazas al viaj tajpitaj (ofte eĉ manskribitaj) raportoj aŭ artikoloj antaŭ ol ili aperas en sia presita vesto?

Plej unue la redaktoro kompreneble trarigardas la alsenditan kaj menditan materialon. Li decidas, kio aperu en la venonta numero kaj faras per krajono notojn pri necesaj mallongigoj kaj korektoj rekte en la manuskriptojn. Poste sekvas la kompostado (*sättning*), kiu nuntempe signifas, ke oni enskribas la tekstojn per komputilo (*dator*). La kompostantoj dum sia laboro ankaŭ forsarkas (*rensar ut*) eventuale restantajn erarojn, por ke la lingvaĵo (*språkdräkten*) estu unueca kaj ĝusta.

Post la redaktado kaj kompostado ĉiuj tekstoj aperontaj en la gazeto do troviĝas en komputila formo sur disketoj aŭ durdisko (*hårdisk*). Ankaŭ ĉiuj fotoj kaj aliaj bildoj troviĝas en la komputilo, enlegitaj per tiucela aparato, la skanilo (*scanner*).

La sekva paŝo estas aranĝi la materialon sur la paĝoj de la gazeto. Antaŭ nur kelkaj jaroj oni farus tion mane, per tondilo kaj gluo; la kompostitan tekston oni tiutempe ricevis kiel unu kolumno (*spalt*) sur longa strio de papero, kiun oni tondis en pecojn kaj dismetis sur la paĝojn. Inter ili oni gluis la fotojn kaj aliajn ilustraĵojn. Ekde kelkaj jaroj la enpaĝigo (*ombrytning*) tamen okazas sur la ekrano (*bildskärm*) de



Tiel ĉi aspektis la paĝoj 8 kaj 9 de tiu ĉi *La Espero* sur la komputila ekrano dum la enpaĝiga laboro. Apude iuj artikoloj kaj bildoj atendas sian vicon. Supre-dekstre unu artikoleto estas markita por posta enmeto sur la paĝon.

la komputilo. Multaj principoj de la laboro tamen restis la samaj. Ankaŭ sur la ekrano oni komencas per tute malplena paĝo, kvankam ĝi estas nur bildo. El la memoro de la komputilo oni portas sur ĝin la tekstojn kaj bildojn.

Kuplita al (*ansluten till*) la komputilo estas la "muso" (*mus, pekdon*); ĝi estas eta aparato, kiun oni per unu mano ŝovas tien-reen sur la tablo kaj tiel movas sago-aspektan montrilon sur la ekrano. Movante la sagon al bildo aŭ peco da teksto kaj poste premante butonon sur la muso, oni povas movi la tekston aŭ bildon al dezirata loko sur la paĝo. Per la muso eblas ankaŭ apartigi erojn de la teksto por ŝanĝi ilian aspekton. Oni markas iun teksteron kaj poste per komputi-

la komando faras el ĝi ekz. grandan titolon (*rubrik*), aŭ nur emfazas ĝin per kursivaj aŭ dikaj literoj. Estas rapida afero ŝanĝi la grandecon, stilon aŭ eĉ la litertipon (*typsnitt*) de la teksto kaj provi diversajn paĝaranĝojn (*lay-out*), ĝis oni estas kontenta pri la aspekto de la paĝo.

La paĝo ekhavas fizikan ekziston nur kiam oni printas (*skriwa ut [dat.]*) ĝin per lasera printilo (*laserskrivare*) aŭ per fotokompostilo (*fotosättare*). Se oni ne trovas erarojn en la presprovaĵo (*korrektur*) – ja facile korekteblajn en la komputilo – la printaĵo (*utskrift*) fariĝas la originalo, laŭ kiu la presisto faras sian presplakon (*tryckplåt*) por ofseta presado (*offset*).

Per Aarne Fritzon

Till årets slut

360,-

Ordbok Svenska-Esperanto.

Ca 500 sidor, inbunden. Med de nyaste orden. Priset inkluderar moms och porto.

Postgiro 578-5,
Esperantoförlaget

Esperantaj literoj en via komputoro

Franko Luin skribas:

Esperantaj literoj en Macintosh-komputoroj

Mi solvis jam antaŭ jaroj la demandon de supersignitaj literoj en Macintosh-komputoroj, kiam aktualiĝis la bezono denove komposti *La Esperon* per propraj laborfortoj. Eblas en tiu komputoro skribi la esperantajn literojn, sed la literaro devas esti preparita por tio.

En Macintosh mi sukcesis aranĝi la literojn laŭ relative logika solvo (almenaŭ logika al mi), facile memorebla. Pere de la *alt*-klavo multaj literoj kun supersignoj estas rekte alireblaj en ĝia sistemo, tiel ke la literon *ĉ* eblas fari per *alt+c*; kaj la aliajn literojn simile. La escepto fariĝis *ŭ*, kiun mi devis lokigi alie en la karaktrotabelo, sed tamen al la iom logika litero *w*.

En Macintosh-komputoroj oni skribas, uzante svedan klavaron kaj mian solvon, la esperantajn literojn jene:

ĉ	per premo de <i>alt + c</i>
ĝ	per premo de <i>alt + g</i>
ĥ	per premo de <i>alt + h</i>
ĵ	per premo de <i>alt + j</i>
ŝ	per premo de <i>alt + s</i>
ŭ	per premo de <i>alt + w</i>

La majusklojn oni faras same, sed per majuskla sensupersigna litero.

Sed tiu solvo taŭgas nur por la komputoroj vendataj en Svedio, kun la sveda klavardifino [preskaŭ ĉiu lando havas propran difinon, per kiuj klavopremoj oni atingu la diversajn literojn]. Por internacia uzo estus pli taŭge havi neŭtralan logigon de la literoj en la karaktrotabelo kaj specialan difinon de esperanta klavaro. Tio eblas kaj estas ankaŭ jam farita de Derk Dam, kiu, ĉar programisto, postulas sisteme ĝustajn solvojn. Uzante Sistemon 7 en Macintosh estas facile instali plian klavardifinon. Tio eblas ankaŭ en la pli fruaj sistemoj, sed instalo postulas pli profundajn konojn pri la interno de la sistemo, tial tio ne prezentas solvon taŭga por ĉiu uzanto.

Esperantaj literoj en IBM-kongruaj komputoroj

IBM-kongruaj komputoroj povas funkcii kiel esperantigitaj komputoroj, kiam ili estas difinitaj kiel grafikaj maŝinoj. (Ekzistas aliaj solvoj, dependaj de unuopa programo kun solvo specifa por tiu programo; tia ekzemplo estas la vortprilaboro programo *WordPerfect*.) Uzante *Windows*, kiu imitas la sistemon de Macintosh, oni atingas tion. La plej nova versio de *Windows* enhavas novan teknologion generi litertipojn sur ekrano, nomata *TrueType*. Ankaŭ ĝi devenas de Apple, la kompanio de Macintosh. Ĉar *TrueType* ankaŭ estas uzata en Sistemo 7 de Macintosh, estis logike pensi, ke solvo funkcianta en Macintosh ankaŭ povos taŭgi en IBM-kongruaj komputoroj.

Ja funkcias, sed ĉar la solvo en Macintosh ne estas ideala kaj krom tio ne estas aplikebla al la IBM-mondo (kie la *alt*-klavo havas parte alian uzon), necesis trovi alian solvon. Uzi *alt+ansi*-kodon de la respektiva litero, kio ebligas havigon de la bezonata litero en *Windows*, estus solvo taŭga por masohistoj, ne por ordinaraj esperantistoj. [*Ansi* estas la kodigo, kiun *Windows* uzas anstataŭ la kodigo *Ascii+*, kiun IBM kaj aliaj uzas por la *dos*-sistemaj programoj]. Krom tio la solvo devas esti klavar-sendependa, tio estas, oni devas povi utiligi ĝin en kiu ajn lando. Kial ne aranĝi tiel, ke oni atingas la esperantajn literojn en simila maniero, kiel dum tajpado sur malnovstila tajpilo?

Nu, ĝuste tiel mi solvis tion. Per literfara programo en mia Macintosh mi anstataŭis la vokalojn kun cirkumfleksa (*âêîôû*) per la esperantaj literoj kun cirkumfleksa (*ĉĝĥĵŝ*). Por vidigi la originajn literojn oni devis premi dufoje (akcento + litero); ekzakte same oni faras por la esperanta solvo.

Sed tio okazis je la kosto de malhavo de vokaloj

kun cirkumfleksa. Por *ŭ* mi forprenis la literon *ō*, kiun mi opiniis ne nepre necesa. La portugaliaj esperantistoj certe pretaŭ pendigi min pro tio.

La esperantajn literojn oni skribas jene:

ĉ	per premo de <i>^ kaj a</i>
ĝ	per premo de <i>^ kaj e</i>
ĥ	per premo de <i>^ kaj i</i>
ĵ	per premo de <i>^ kaj o</i>
ŝ	per premo de <i>^ kaj u</i>
ŭ	per premo de <i>~ kaj o</i>

[Rimarku la sinsekvon *a e i o u kaj ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ*.]

La majusklojn literojn oni faras same, sed per la majuskloj vokaloj.

Vi povas plifaciligi tiun taskon, se vi faras komandoĉenojn ("macro"). La *Windows*-programeto por tio estas en al sveda nomata "Inspelaren". Per ĝi vi povas, ekzemple, lokigi la esperantajn literojn al la F-klavoj. Mi havas ilin je F1 — F6, kaj mi faras la esperantajn literojn per *ctrl+F1* ktp. Ĉar malsamaj komputormodeloj havas apartajn klavarojn, la solvoj estos iom apartaj.

Speciala litertiparo

Mi faris specialan esperantigitan litertiparon, kiu sekvas ĉi tiujn regulojn, de kiu vi vidas ĉi-sube grandigon de la litero *ĝ*.

Kial speciala litertiparo?

En mia laboro mi uzas grandan kvanton da malsamaj litertipoj. Sed ili ĉiuj estas komercaj kaj sub kopirajto; distribui senpage esperantajn versiojn de ili estas kontraŭleĝe. Pro tio mi faris, laŭ propono de Per Aarne Fritzon, originalan litertiparon, kiun mi povas disponigi senkoste al aliaj esperantistoj. Ĉin mi nomis *Publika*, ĉar ĝi estu por publika uzo de esperantistoj. Ĝi bone taŭgas por kompostado de libroj kaj ga-



zetoj. Ĝi estas havebla ankaŭ kiel *Post-script*-litertiparo, se oni preferas labori per tiu solvo; kaj en ambaŭ formatoj ankaŭ ekzistas la litertipoj por Macintosh. Ĝi kompostiĝas bone sur ajna kompostilo: de ŝpructeknika aŭ lasera printilo al fotokompostilo. Eĉ matricaj printiloj povas prezenti decan kvaliton.

Publika ekzistas en jenaj variaĵoj:

Publika normala
Publika dika
Publika kursiva
Publika dika kursiva

La litertiparo *Publika* estas havebla por 100 kronoj (kovras la kostojn de la disketo, kopiado kaj dissendo) de la jena adreso:

TEF/Tyresö Esperantoförening
 Mygdalsvägen 123
 135 42 Tyresö, Svedio

Instalita, la litertipo estas uzebla de ĉiuj programoj, kiuj funkcias sub *Windows*.

Mendante de TEF, indiku klare la komputerspecon (*Macintosh* aŭ *PC*). Sur la disketo estas kaj *TrueType* kaj *Post-script*-versioj de la litertiparo.

Vi rajtas libere distribui ĝin al viaj konatuloj,

sed nur senpage. Ĉu vi povos printi viajn dokumentojn kaj reteni la ĝustan aspekton, dependas de via printilo. Se vi uzos alian litertipon ol *Publika* en via IBM-kongrua

komputoro, vi ekhavos en la teksto la vokalojn kun cirkumfleko (^) resp. tildo (˘) anstataŭ la esperantaj literoj. En Macintosh-komputoroj vi rimarkos tute aliajn literojn, se vi uzos, ekzemple, *Times* aŭ *Helvetica*.

Noto 1: Eĉ se la litertiparo estas 'senpage', la kopirajton retenas la farinto de la literoj, t.e. Omnibus, Box 135, S-135 23 Tyresö, Svedio.

Noto 2: Ĉi tiu artikolo estas en sia tuto kompostita per *Publika*.

Novajo!

La vortaro ankaŭ komputore!

La svedaj esperantistoj, kiuj estas ankaŭ posedantoj de Macintosh-komputoro, povas aĉeti la novan svedan-esperantan vortaron ankaŭ en komputora formo. En malpli ol monato Per Aarne Fritzon, kiu laboras ĉe la firmao Omnibus en Tyresö, tralaboris la enhavon de la vortaro por komputora uzo.

Lia tasko ne estis tute facila. La teksto de la vortaro, eĉ se jam en komputoro — kion Derk Dam el Stokholmo aranĝis per sia plurjara rekodiga laboro — ne taŭgis por perkomputora serĉado. La teksto aperas en la libro en tekstoblokoj, kun multaj mallongigoj. Se vi, ekzemple, volas ekscii la esperantan esprimon por *för-blöda*, vi devos serĉi unue la vortojn, kiuj komenciĝas per *för-* kaj inter ili *-blöda*. Ĉiuj vortaroj estas organizitaj en simila maniero, por povi enpreni kiel eble plej multe da informoj sur la paĝojn.

gramado por atingi tion — eblis komenci labori per la strukturo de la datenbazo, en kiu vi serĉos viajn vortojn. Ĉar ĉiu Macintosh-maŝino estas provizita per la programo *HyperCard*, kiu ebligas rapidan serĉadon (kaj estas krom tio senpage). Per Aarne elektis tiun programon por solvi la taskon.

Multaj estas la avantaĝoj, kiujn prezentas komputora vortaro. Imagu, ke vi estas verkanta artikolon en esperanto (aŭ tradukanta ajnan svedan tekston). Vi scias, kion vi volas diri, sed jen kaj jen vi ne trovas la ĝustan esperantan esprimon. Vi devas forlasi la tajpilon (aŭ komputoron, se vi uzas ĝin por via laboro) foliumi en la vortaro, ĝis vi trovas la bezonatan vorton aŭ esprimon.


Konsultu dum vi laboras

Se vi havas la vortaron en komputoro, vi povas en unu 'fenestro' skribi vian tekston kaj havi en alia 'fenestro' la vortaron. Kiam vi malcertas pri iu vorto, vi musklakas al la vortara 'fenestro', enskribas la serĉatan vorton kaj post kelkaj sekundoj en la 'fenestro' aperos la vortoj, kiujn Ebbe Vilborg proponas al vi en sia libroforma vortaro. La enhavo estas en ambaŭ identa. Vi povas marki la vorton, kiu taŭgas por vi, premi al "Kopiu"-butono kaj, ree en via prilaborata dokumento, englui la vorton. Tiel vi facile evitas, ke vi misliterumu (kaj, se vi estas mallaborema, tio ŝparigas al vi neneceajn fingromovojn).

Sed la proponitaj vortoj eble ne tute kontentigas vin. Per Aarne aranĝis, ke vi povas ankaŭ serĉi en la priskriba parto de la vortaro. La vortaro enhavas nome ne nur vortojn, sed ankaŭ esprimojn kaj frazerojn, kaj via vorto povas aperi kunlige kun alia vorto.

Ĉar tiu serĉado okazas tra la tuta vortarmaterialo kaj ne nur inter la 48 000 ĉefvortoj [tiom la vortaro de Ebbe Vilborg enhavas], tio daŭras iom pli longe. La daŭro dependas de la rapideco per kiu via komputoro laboras, kaj de la serĉata ero — ju pli preciza, des pli rapida.

La rezulto estas elĉerpaĵo el la vortaro



En komputoro vi faras viajn demandojn en skriba formo, serĉante la tutan vorton, tio estas *förblöda* kaj ne *-blöda*. Estis do necese reorganizi la tutan tekstomaterialon, tiel ke ĉiuj ĉefvortoj, tio estas ĉiuj vortoj, kiuj aperas en la vortaro per dikaj literoj, estu samnivela kaj kompletaj. Necesis ankaŭ per vorto anstataŭigi la tildon, kiu en la ekzemploj indikas, ke vi legu en tiu pozicio la ĉefvorton.

Kiam tiu laboro estis farita — kaj vi estu certa, ke necesis multe da lerta pro-

kun ĉiuj lokoj, kie via serĉata vorto aperas. Ĝin vi povas tuj konsulti kaj eĉ redakti, aŭ ŝpari en aparta dokumento por pli posta prilaboro. Tio estas tasko, kiu ne eblas per ordinara vortaro, speciale ne en la daŭro de kelkaj minutoj!

Pionira novaĵo

Komputora vortaro — tio ja ne estas io speciale nova, vi diros, pensante pri la elektronikaj vortaretoj, kiuj povas montri al vi vortojn en deko da malsamaj lingvoj. Tio ja ekzistas, sed ilia uzo estas tre limigita — same limigita kiel la kvanto da vortoj en ili. Pri veraj vortaroj la situacio estas alia: provu iri en libro- aŭ komputorvendejon kaj petu pri komputorvortaro inter la sveda kaj angla. Vi plej verŝajne ne trovos tion, sed laŭdire ekzistas. Ĉi tiu sveda-esperanta vortaro estas iasence pionira. Ne malbone de la 'malgranda' lingvo esperanto, ĉu? Kaj ne malbone de la malgranda entrepreno Omnibus, por kiu ĉi tio estis tute nova laborkampo.

Baldaŭ ankaŭ por IBM-kongruuloj

La nun preta solvo taŭgas por uzantoj de la komputoroj Macintosh, sed jam komenciĝis la laboro por ebligi ankaŭ al la uzantoj de IBM-kongruaj komputoroj utiligi la komputoran svedan-esperantan vortaron. Tiu solvo funkcios same kiel la Macintosh-versio kaj funkcios en komputoroj, en kiuj estas instalita *Windows*.

La eldonanto de la elektronika vortaro, same kiel de la vortaro-libro, estas Eldona Societo Esperanto. La vortaro estas sur kvin disketoj en komprimata formato. Malkomprimata la vortaro okupas 9 MB sur durdisko kaj plej bone laboras per iom abunda labormemoro (prefere 4 MB), precipe se vi intencas uzi ĝin dum vi utiligas ankaŭ vortprilaboran programon.

La komputora sveda-esperanta vortaro kostas 600 kronojn ĉe Eldona. Al la kvin vortardisketoj estas aldonita disketo kun versio 2.0 de la programo *HyperCard* kaj disketo kun la litertiparo *Publika*, per kiu eblas plu-prilabori la esperantajn tekstojn.

Estas havebla ankaŭ demonstro-disketo (kun plene funkcia solvo, sed limigita al la literoj A, B, C kaj D) por 50 kronoj. Ĝin oni plej simple mendas per pago al la poŝtgira konto de Eldona (578-5, Esperantoförbundet), kun la indiko "Demodisketo".

Franko Luin

Tra la mondo

Rekorda jaro por ekzamenoj

Cent du kandidatoj sukcesis en la lingvaj ekzamenoj de UEA/ILEI en 1991. Ekzamenoj estis organizitaj en ok landoj. Se via klubo volus gastigi internacian lingvan ekzamenon de UEA/ILEI dum iu aranĝo, kontaktiĝu kun: S-ino Marie Hunninck, Esperanto, Centre Culturel "La Charité", B.P. 136, F-84200 Carpentras, Francio.

La Kvinpetalo

Ni volis plialtigi nian lingvonivelojn, samtempe ripozi kaj kaj interkonatiĝi kun aliaj esperantistoj. Sed kien iri?

Feliĉe ni trovis la perfektan lokon, kiu ofertis altnivelan lingvoinstruadon, amikan hejmetoson kaj interesan ĉirkaŭaĵon. Tio estas **La Kvinpetalo** en Bourgesse, 350 kilometrojn sude de Parizo.

Dum unu semajno, de la 26-a de aprilo ĝis la 1-a de majo, ni ĉiutage studis esperanton inter la horoj 9-a kaj 19-a. En la kurso partoprenis krom ni ankoraŭ dek du esperantistoj, plejparte francoj. Ni

analizis gramatikajn malfacilaĵojn, konatiĝis kun gravaj esperanto-verkoj, vizitis ĉirkaŭajn vidindaĵojn kaj gaje pasigis la tempon kune. Laŭ la kutimo en **La Kvinpetalo**, ni ĉiuj partoprenis en la ĉiutaga majstrumado kaj tiel unuigis familiece.

Bouresse estas ĉarma mezepoka urbo ĉirkaŭita de kampoj kun kaj sen ŝafoj. En la proksima granda urbo Poitiers troviĝas ne nur imponaj romanikaj preĝejoj el la mezepoko, sed ankaŭ "parko de la estonteco" kun i.a. la plej granda kino-ekrano de Eŭropo. Francio vere estas lando de kontrastoj! Ni veturis ne nur en spaco, sed ankaŭ en tempo!

Jes, tien ni tre volonte revenos!

Anita Bergh

Agneta Emanuelsson

Svisa Radio transiras al kasedoj

Svisa Radio Internacia subite ĉesis sendi esperantlingvajn programojn. En la estonteco ili anstataŭ produktos esperantlingvajn kasedojn, kiujn povos aboni naciaj kaj lokaj radio-stacioj.

Aperas 2-semajne!

Eventoj

Sendependa internacia gazeto pri la Esperanto-Movado!
Aktualaj informoj, eventoj, faka aplikado,
kaj represo de elektitaj artikoloj el la esperanta gazetaro.
Aperas ekde marto, kotizperantoj en 22 landoj.
Aboneblo ankaŭ por duonjaro en 1992!

Abonkotizo por 1992: **166 SEK** aerpoŝte **195 SEK**
por la dua duonjaro: **100 SEK** aerpoŝte **113 SEK**
La abondeziron kun via adreso sendu al LINGVO-Studio,
La kotizon al la sveda peranto:

pg 14 74 29 - 5,

Esperantoförbundets specialkonto, Hörby.

Petu provexempleron de:

LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87, Hungario

Altranga literatura seminario

*Vi ne povas ŝarĝon
porti pli bonan
ol saĝa scio.*

Havamal

Saĝan scion vere ricevis la partoprenantoj en la literatura seminario, aranĝita de la Suda Distrikto kaj la Okcidenta regiono de SEF ĉe Gullbrannagården, Halmstad, la 25-an kaj 26-an de aprilo.

Gvidis la seminarion la norvega literature eminenta duopo Odd Tangerud kaj Jon Rømmesmo. Ili donis vastan superriĝardon de la nordia literaturo, precipe la norvega, de la malnova Edda ĝis la modernaj poetoj.

Odd Tangerud lerte kaj humore prezentis islandajn poetojn kaj malnovajn popolkantojn, sed antaŭ ĉio li donis al ni ekzemplojn de la verkaĵoj de Alf Prøysen. Tiu aŭtoro, kun nur sesjara popollerneja eduko, dum sia vivo skribis noveletojn kaj kantojn, kiuj trafe agordas kun la internaj sentoj de la popolo en niaj nordiaj landoj. Tial ni konas kaj amas liajn verkojn. Ni kantas kaj legas ilin kun plezuro. En la nova brila traduko de Odd pli da homoj en la mondo povas ekkoni la verkojn de Alf Prøysen. Kiam Odd mem prezentas kaj analizas la verkojn li transiĝas al la aŭskultantaro la internajn sentojn, amon akj vivon. Ĉion ni ricevis ĉe Gullbranna.

Jon Rømmesmo, la trankvila pensanta artisto, gvidis nin tra la poezia mondo de infanaj rimajoj, malnovaj islandaj aliteraciaj versaĵoj, popolkantoj, poeziaĵoj kun kaj sen puraj rimoj, proverboj kaj la plej modernaj poetoj per firma mano. La prezentado de Jon iom post iom igis nin vidi, kompreni kaj pripensi la poezion en nova maniero. Ni multon lernis pri la leĝoj, kiujn oni devas respekti, kiam oni verkas kaj tradukas poezion. Kun tiu scio ni nun multe pli bone komprenas la grandan laboron, kiun la preparo de tiu seminario postulis.

Dum la sabatvespero Jon Rømmesmo per lumbildoj prezentis norvegajn pentristojn kaj skulptistojn kaj iliajn verkojn.

Li mem estas artpentristo kaj li speciale okupis sin pri la grupo, al kiu li apartenas.

Alia vespera programero estis aktora prezentado de komediaĵeto de Ĉeĥov. Odd ludis ĉiujn rolojn majstre kaj, kompreneble, li mem tradukis la verkon.

Jes, estis bona enhavo de tiu seminario. Se vi estontece havos eblecon aŭskulti Odd Tangerud kaj Jon Rømmesmo, ne maltrafu.

Bertil Andreasson

Helpvojaĝo el Skövde

La klubo en Skövde ne nur progagandas Esperanton, kvankam tio kompreneble estas ĝia ĉefa celo. Kun 40 manĝaĵpak-aĵoj k.t.p. kolektitaj de la urbaj esperantistoj Stig Kinnander vojaĝis al Estonio.

3200 libroj en Malmö

La klubo en Malmö havas nun 3200 librojn, inter kiuj troviĝas preskaŭ ĉiuj eldonitaj "ŝlosiloj". La biblioteko, kiun or-

digis Anna-Greta Strönne, estas la plej granda kluba esperanto-biblioteko en Eŭropo.

750 000 000 000 kronoj

Tiom kostas la plurlingveco de Eŭropa Komunumo. Tion oni eksciis se oni vizitis ekspozicion en la urba biblioteko en Kungälv, kiun aranĝis la tiea klubo. 16 vizitintoj aliĝis al komencantula kurso. La radioprogramo "Morgonpasset" faris intervjuon kun klubanoj.

Filmo en Västerås

La klubo en Västerås produktis VHS-videofilmon pri la Kultura Esperanto-Festivalo en Västerås. Enestas Nataŝa, Ĵomart, Oksana, Vladimir, Jerzy Fornal, Krizalido, Interateliero, Persone, Amplifiki k.t.p. La filmo estis dissendita per la loka televizi-reto.

Ĝi kostas 200 kronojn. Mendu ĝin ĉe: La Esperanto klubo, Soldatgatan 40, 723 45 Västerås.

Skövde Esperantoklubb 60-jara

Jubilea festo sabaton la 17:an de oktobro je la 16:a horo en Blåbandslokalen, Ekängsvägen 10, Skövde.

Ni bonvenigas gastojn el tuta Esperantujo. Aliĝo antaŭ la 1:a de oktobro skribe al klubprezidanto, K. G. Gustafsson, Aspvägen 1 A, 541 41 Skövde, aŭ per telefono 0500/309 73.

Kotizo: 75 kr por la tuta vespero kun festmanĝo.

Recenzoj

De ebena ĝis ĵus

– dua liveraĵo de Esperantaj etimologioj

Ebbe Vilborg: **Etimologia Vortaro de Esperanto**. Volumo 2: E - Ĵ. Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1991. 24x17 cm, 114 pĝ. Prezo: 95 SEK. ISBN 91 85288 19 5.

En n-ro 3/1990 de *La Espero* aperis mia recenzo de la unua volumo de *Etimologia Vortaro de Esperanto* (EVE), do mi ne ripetos tie ĉi la ĝeneralajn komentojn en tiu recenzo. Nur unu punkto bezonas emfazon nuntempe. Temas pri la bezono aldoni etimologiajn donitaĵojn al reviziota eldono de *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV). Tiu propono jam fariĝis aktuala, ĉar en majo 1991 la Plenum-Komitato de SAT anoncis prilaboradon de korektoj kaj modifoj por nova eldono de PIV. Sekve, konvenas pritrakti la gravecon de konciza etimologia informo kiel parto de ĉiu vort-artikolo. Ĉi-rilate, kompreneble, EVE estos nemalhavebla konsultlibro por tiu aspekto de la leksikografia laboro.

Foliumante la duan volumon de EVE, mi trovis ne malmultajn temojn por pli profunda esplorado fare de esperantologoj kaj interlingvistoj. Ĉar d-ro Vilborg registras ne nur etnolingvaj etimojn kaj apogantajn vortformojn sed ankaŭ ekvivalentojn en aliaj planlingvoj – precipe Ido, Occidental/Interlingue kaj Interlingua – estas eble spuri la influon de Esperanto sur tiujn lingvojn, kiuj aperis poste. Temas pri esperantismoj, Esperantaj vortoj, kies formon kaj signifon depruntis la aliaj planlingvaj projektoj, do ili ne baziĝas sur etnolingvaj etimoj.

Jen tri ekzemploj. Ido kaj Occidental/Interlingue ambaŭ havas la Esperantan vortformon "ekster": sekve, ĝi ne estas derivebla senpere de la nemodifita latina vorto *extra*. La prononco de "fajro" en esperanto venas de *A fire*. Ĝi aperas en Ido kiel la esperantismo "fairo". Zamenhof formis la vorton "juna" surbaze de la komparativo *iunior* de *L iuvenis* "juna" kun influo de *G jung* kaj *R junyj* kaj apogo de *A young* kaj *F jeune*. Nek Ido nek Occidental/Interlingue utiligis etnolingvaj etimojn sed alprenis la esperantisimojn "yuna" kaj "yun" respektive ("y" = j).

La dua volumo de EVE enhavas ampleksan pritrakton de "edzo", kiu laŭ doktoro Vilborg, estas "sendube la plej diskutata ero de la etimologio de Esperanto". Li akceptas la klarigon, kiun Zamenhof mem donis en 1906 kaj 1913, ke la deirpunkto de la formo "edzino" estas la finaĵo de *G Kronprinzessen*, kiu estis transskribita en Esperanto kiel "kronprincezino". La radiko "esin/-" ne estis uzebla, ĉar la retroformita vorto "es/-" kolizias homonimece kun la finaĵo "-es", kiu indikas la arkaĝintan imperfektan tensecon de verboj. Sekve, Zamenhof ŝanĝis "es" al "edz". D-ro Vilborg ne akceptas rektan prunton de "edz-" el la jida lingvo.

Utila por didaktikaj celoj

EVE estas tre utila ankaŭ por didaktikaj celoj. Unu el la ekzercoj por lernantoj de Esperanto estas la kolektado de vortoj etimologie apartenantaj al la sama vort-familio. La donitaĵoj en la vort-artikoloj ebligas spuradon de la morfologia kaj semantika historio de vortoj tra diversaj etnolingvoj ĝis Esperanto. La rezulto estas pligrandigo de la vortprovizo kaj plivastigo de kultura scio. Jen ilustraĵo bazita sur la latina verbo *fari* "paroli".

"Infano" venas de *L infans*, kunmetaĵo de *in* "ne" kaj *fans* "parolanta". Sekve, "infano" origine signifis "kiu ne parolas".

Infanoj ŝatas aŭskulti fabelojn kaj fabelojn. La ĝemelaj radikoj "fabelo" kaj "fablo" ambaŭ devenas de *L fabula* "parolo", kiu poste ricevis la signifon "rakonto", "fablo".

Ofte feoj kaj feinoj rolas en fabeloj. Etnolingvaj ekvivalentoj de "feino" en la latinidaj lingvoj estas spureblaj al la vulgara latina vorto *fata* "diino de la fatalo", kiu venas de *L fatum* "fatalo", "sorto", origine "(orakola) eldiro". Parencaj vortoj estas la zamenhova "Fato" kaj ĝia sinonimo "Fatalo".

Ankoraŭ unu ido de la latina verbo *fari* estas *fama*, origine "diritaĵo", kiu estas la etimo de "famo" en Esperanto.

La ĉi-supra rikolto da vortoj devenantaj el *L fari* estas nur parto de multe pli vasta parenkaro, kiun oni povas malkov-

ri per pacienca tralegado de EVE.

Ankoraŭ unu pritraktenda temo koncernas la nombron de kreitaj aŭ inventitaj elementoj en la leksiko de Esperanto, t.e. vortoj, kies etimologia rilato al aliaj lingvoj ne estas facile demonstrebla. Estas esperantistoj, kiuj rifuzas akcepti la eblon, ke Zamenhof arbitre elpensis vortojn, do ili elcerbigas fantaziajn etimologiojn aŭ serĉas etimojn en lingvoj, kiujn la aŭtoro de Esperanto ne konis. Ĉi-rilate d-ro Vilborg enkondukas sian pritrakton de kvar vortoj kun necerta deveno per la sekvaj komentoj:

eĉ - "malfacile konstatebla etimologio"

farti - "sen evidenta etimologio"

ĝi - "necerta etimologio koncerne la konsonanton"

je - "semantike tiu ĉi vorto ... havas nenium ekvivalenton en la fontlingvoj".

Nuntempe oni povas nur spekulativi, ĉu en la manuskriptaj kajeroj, kiujn lia patro bruligis, Zamenhof faris notojn pri la etnolingva deveno de vortoj, kies formo estis poste draste modifita en la versio de la lingvo publikigita en 1887.

Bernard Golden

Du novaj muzikkasedoj

Esperanto. Muziko Tutmonda.

Muziko de Rainer Conrad.

Jen nova kasedo kun muziko tutmonda. Malantaŭ tiu nebula esprimo sin kaŝas modernaj melodioj, originale verkitaj en la angla, tradukitaj esperanten. Kun profesinivela ludado de Rainer Conrad, kiu mem ludas ĉiujn instrumentojn – tion ebligas moderna teĥniko – la kasedo fariĝis perlo. Mi ĝuas ĝin kaj volonte ludas ĝin por miaj neesperantistaj amikoj.

Trifolio kantas en Esperanto.

Lotta Johansson, Ulrika Sjögren, Adina Giselsson kaj Karin Sandgren.

Jen tute aliatipa kasedo, sed same bonkvalita. Kantas tri knabinoj kun tradicia gitara akompanado. Ni renkontas konatajn melodiojn kiel: *Rosa en balo*, *Valso de Calle Schewen*, *Danko al la vivo* k.t.p. La kasedon oni povas aŭ tutsimple ĝui, aŭ uzi por lerni la kantojn dum ekz. klubkunveno.

Leif Nordenstorm

Pri esperanto kaj lingva sento

La suba teksto estas mallongigita versio de artikolo el Malgranda Revuo 2/1945. La amplekso kaj kelkloka malaktualeco de la origina artikolo necesigis la priredaktadon, sed la ĉeno de argumentado restas, kaj ĝi estas daŭre aktuala kaj pripensinda. Stellan Engholm alportis kiel originala verkisto, tradukanto kaj redaktoro de kultura revuo gravajn kontribuojn al la lingvo kaj kultura vivo esperanta. (Ne multaj esperantaj verkistoj havos propran artikolon en la eldonata sveda Nacia Enciklopedio!) Indas atenti, kion li skribas pri zorga respekto al la lingvo. Plenan Vortaron anstataŭis PIV, la Plenan Gramatikon PAG, aldoniĝis pliaj "iloj de necesa lernado". Des pli granda kaŭzo studi kaj uzadi ilin!

La lingvosento rilate al la propra lingvo ne estas io mistera kaj neklarigebla. Imagu kiom da ekzerco havas infano de sia unua lingva sono ĝis sia sepa jaro! En tiu aĝo la pli grava parto de la lingvosento estas akirita, kaj ĝi estas akirita sen peno kaj kun ĝojo. Poste komenciĝas la akiro de la kultura lingvo kaj ĝi estas longa, peniga kaj ofte teda. La unuan parton de la lingvoinstruado prizorgas la naturo, la dua estas homa elpensajo. En kulturlingvo kun vasta literaturo temas pri akiro de lerto kaj rutino, kiujn amaso da lingvomajstroj kune akiris dum multaj jarcentoj!

Ĉu vere estas eble akiri tian senton por esperanto, kian ni havas por nia gepatra lingvo? Mi pretendas, ke nepre jes. Kiel oni akiru ĝin? Same kiel ni akiras la senton pri la gepatra lingvo, escepte la unuaŝtupan lernadon de malgranda infano. Nur malofte iu komencas lerni esperanton per imitado de vortoj kaj interparolo. Krome logiko kaj persona lingvokreado ludas en esperanto pli grandan rolon ol en naciaj lingvoj. Sed cetere estas la sama afero.

Komencan kurson de esperanto oni povas kompari kun la antaŭlerneja lingvolernado de infano. Oni lernas la samajn fundamentajn aferojn. Diferenco estas, ke infano lernas nekonscie, esperantolernanto konscie. Sed kontraŭe al lernanto de fremda nacia lingvo, la esperantolernanto lernas aŭ ĉiukaze devus lerni tiel, ke la lingvo en la fino de la kurso ne ŝajnas al li fremda sed jam intime konata afero, kiun li

ĝis certa grado povas mem regi kaj laŭ propra pensopovo uzi korekte, same kiel sesjara knabo uzas la gepatran lingvon. Li scias certan kvanton da vortoj, kaj li scias – kio estas tre grava – la tute precizan sencon de tiuj vortoj, li scias, kiel oni fleksas la vortojn kaj konstruas frazojn. Multege da vortoj kaj frazoj li povas mem konstrui, kvankam li antaŭe ne vidis aŭ aŭdis ilin. Por uzi tiun fundamentan parton de sia nova lingvo, li bezonas nur racie uzi sian propran pensopovon. Ĝi estas jam io, kion li ĝis certa grado mem regas, sekve io propra.

Bedaŭrinde ne ĉiam estas tiel. Kaj bedaŭrinde la daŭrigata studado ne ĉiam havas kiel rezulton veran proprigon de la lingvo kaj tiun lingvosenton, kiun ni pli malpli havas rilate al la gepatra.

Tro ofte oni lernas esperanton – mi pensas ne nur pri la komenco – same kiel nacian fremdan lingvon. Oni mekanike lernas vortojn, gramatikajn aferojn, esprimojn. Poste oni skribante kaj parolante same mekanike uzas la lernitajn aferojn kaj kredas, ke ĉio estas korekta kaj bona. Esperanto estas nenies nacia lingvo – ĉu do estas bezonataj certaj reguloj krom la dek ses?

Se oni tiel lernas, uzas kaj ekzercas la lingvon, ĝi estas por la uzanto precize tio, kion eksteruloj opinias, ke ĝi estas: ia kodo, per kiu oni povas mekanike kaj ĝis certa grado komprenigi al aliaj personoj tion, kion oni volas esprimi. Uzado de la lingvo estas kvazaŭ solvado de krucvortaj aŭ aliaj lingvaj enigmoj: se ĉiu litero

troviĝas en la ĝusta loko kaj la rilato inter literoj kaj vortoj estas ĝusta, la solvo nepre devas esti perfekta. Ĉe tia uzanto de la lingvo troviĝas malmulte da lingvosento. Lia esperanto ne estas vera, vivanta lingvo sed kodo.

Sento pri la lingvo

Mi diris, ke ni akiru "senton" por la lingvo, same kiel ni akiras ĝin en la gepatra. Detale mi ne povas trakti tion tie ĉi, sed mi donu kelkajn sugestojn.

Ĉiu esperantisto same kiel knabeto en nacia lingvo tute precize scias la signifon de de la vortoj "tablo", "seĝo", "pordo" kaj ne intermiksas ilin. Eĉ se li lernas preskaŭ nur mekanike, ŝajnas al li memkompreneble kaj necese uzi ilin nur laŭ ilia senco.

Esperantistoj do hontus skribi "tablo" kiam devus esti "seĝo", sed ili tute ne hontas skribi "farmisto" anstataŭ "terkulturisto", "konsternigi" anstataŭ "konsterni" kaj centojn da aliaj vortoj ili eventuale povas uzi kun alia senco ol tiu, kiun ili vere havas. Vi diras, ke ili tamen povas kontentige komprenigi sin. Certe. Sed lingvosento ne estas en tio. Lingvosenton tia uzo de la lingvo ne donas, kaj se tia uzo estus ĝenerala, esperanto neniam fariĝus internacia kultura lingvo.

Tiun mankon, se oni rekonas, ke estas manko, oni povas forigi. La rimedo estas la sama kiel en naciaj lingvoj: lernado. Ne tuj kaj senpene la ĝejnuloj akiras la kapablon korekte kaj bone trakti sian nacian lingvon. Plena Vortaro estas mirinda helpilo por nia lingvoekzerco. Tian vortaron ne ĉiuj naciaj lingvoj posedas. Apud la zamenhofaj verkoj ĝi estas nepre necesa fundamento por la uzado kaj evoluo de la lingvo. La samon oni povas diri pri Plena Gramatiko de Kalocsay. La lasta ne estas legaĵo por komencanto, sed ambaŭ libroj estas same necesaj por la lingvo.

Plena Vortaro devas esti norma mezurilo por nia uzado de es-

peranto. Sen tia mezurilo la lingvo fariĝas pli malpli objekto por naciaj kaj individuaj gusto kaj bontrovo. En ĝi ni trovas ne nur la signifon de la vortoj sed ankaŭ abundan kvanton da ekzemploj pri ilia ĝusta uzo en esprimoj kaj frazoj.

Ni havas la rimedojn por necesa lernado. Ĉu ni, kiuj laboras por tiel grandioza celo kiel internacia kultura lingvo, rajtas esti malpli diligentaj kaj zorgemaj pri nia lingvo ol gelernantoj de la diversaj gepatraj lingvoj? Se ni diligente lernas kaj pripensas, ni akiras ankaŭ la deziratan lingvosenton, la kapablon klare distingi vortojn kaj nuancojn kaj elekti tiujn, kiuj estas ĝustaj.


En la naciaj lingvoj la infanoj lernas esprimadon tiel, ke ili komence faras kiel eble plej mallongajn kaj simplajn frazojn, esprimas aferojn tre simple kaj klare. Poste ili iom post iom povas kunmeti pli da propozicioj kaj havi pli da vortoj en ili. Simpla, facile legebla stilo tamen ĉiam restas dezirinda.

Se ni volas bone lerni bone skribi kaj paroli, ni devas same kiel infanoj en gepatraj lingvoj komenci per simplaj esprimmanieroj. Ni devas longe fari eksperimentojn pri ili, provi diversajn esprimmanierojn por eltrovi la plej logikan dirmanieron, la plej bonan vortordon, la plej grandan belsonecon, la plej trafan diraĵon, por lerni forstreki ĉion, kio ne estas necesa. Tiel ni akiras lingvosenton. Poste ni povas, se ni tion deziras, iom post iom transiri al pli komplikita stilo. Uzante tian, ni tamen devas esti same zorgaj kiel antaŭe aŭ ankoraŭ pli.

Memkompreneble modela esperantoliteraturo ludas por la evoluo de la lingvosento la saman rolon kiel nacia literaturo por la evoluo de la sento por la gepatra lingvo.

Sed ĉu tia lingva sento vere estas necesa? Jes. Ni volas, ke esperanto taŭgu kiel internacia kulturlingvo por ĉiuj homoj kaj por

Krucvortenigmo



ĉiuj temoj, de la plej simplaj ĝis tiuj, kiuj postulas la plej altajn kvalitojn de la lingvo. Sed tia lingvo, kulturlingvo, povas estiĝi nur per konscia kulturado de ĝi. Nenia branĉo de la kulturo povas estiĝi, daŭri kaj progresi sen penado kaj senhalta laboro. Jen nia respondeco.

Kiu dum tiaj cirkonstancoj povas fariĝi bona esperantisto? Se tiaj estas la postuloj pri esperantisto, estus pli bone ne okupi sin pri la afero. Multaj homoj ne povas fariĝi unuarangaj stilistoj, eĉ ne duarangaj aŭ triarangaj, kiom ajn ili klopodas.

Nu, ankaŭ en tio ni devas kontentiĝi per la saĝo de la naturo kaj per egalvaloro kun la naciaj lingvoj. Kio fariĝus el aliaj branĉoj de la kulturo, se la ĉefa intereso de ĉiuj homoj estus lingvaj aferoj? En naciaj lingvoj ekzistas multegaj gradoj de lingvoscio kaj lingvosento, de tiuj de malgranda infano kaj neinstruitaj homoj ĝis tiuj de lingvaj profesoroj kaj majstroj de belliteraturo.

Same estas kaj ĉiam estos ankaŭ en la esperanta popolo. Ni havas kaj havos multegajn gradojn de lingvoscio kaj lingvosento; sed la lingvo estas komuna posedaĵo de ni ĉiuj, kaj komuna estas ankaŭ la lingvosento, ĉu granda aŭ malgranda, kaj tiel eĉ balbutanta komencanto ne estas al iu alia eksterulo aŭ naciano.

Sed lingva sento kaj kulturado estas bezonataj. Tial ĉiu el ni kiel eble plej bone administru tiujn talentojn, kiuj estas konfiditaj al ni, ili estu multaj aŭ malmultaj.

Stellan Engholm

HORIZONTALALE

- 1 Dio de medicino
- 2 Temperaturmezurilo
- 3 Female – Granda homgrupo
- 4 Marbirdon – Titol' de kalifo
- 5 Arko – Fari ledon
- 6 Ne tenantan
- 7 Konjunkcio – Itala river'
- 8 Naskas – En team'

Kalendaro

Aldonoj al la kalendaro en La Espero 1992:2.

JULIO

- 15-24 **25-a Internacia Renkonto Naturamika**, Abaliget. (Esperanto, IREN, Pf 2, H-7601 Pécs, Hungario)
- 19-25 **Oficiala antaŭkongreso**, Prago. (Ĉeĥa Esperanto-Asocio, AK'92, Jilská 10, CS-110 00 Praha 1, Ĉeĥo-Slovakio.)

AŬGUSTO

- 4-15 **28-a Internacia Esperantista Feriado**, Kudowa Zdrój (Pola Esperanto-Asocio, P.O. Kesto 16, PL-50-952 Wrocław 17, Pollando)
- 15-17 **50-a Argentina Kongreso de Esperanto**, Mar del Plata. (Mar del Plata Esperanto-Klubo, LKK, Hernandarias 5558, RA-7600 Mar del Plata, Argentino.)

OKTOBRO

- 30 oktobro-2 novembro **Seminario pri minoritataj lingvoj en Nordio**, Nordia Popola Alternajo, Kungälv. Informoj venos.

- 9 Donacan
10 Specialisto pri birdoj

VERTIKALE

- A Okupo de Ebbe Vilborg
B Afrikoŝtate
C Rompiĝis – En ĉi tiu momento
Ĉ Sufikso sen difinita senco – Ovoforme
D Uzas tiu, kiu rigardas malproksimen – Taĉment'
E Korinklina – Atingo
F Mezurita – Sidil' por rajdanto
G Turkpopola – Nomo de la 21-a litero
Ĝ Membr' – Denova far'
H Plene ripozi – Etulo

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	S	O	V	E	T	I	O	■	E	R
2	P	R	E	T	A	K	S	A	T	A
3	A	K	T	A	R	O	■	Z	U	M
4	D	I	E	■	A	N	Ĝ	E	L	E
5	O	D	R	O	N	■	E	N	I	G
6	■	E	■	S	T	A	M	E	N	O
7	M	O	N	T	E	T	A	J	■	■
8	A	N	■	A	L	O	■	O	R	O
9	R	■	K	R	O	M	■	J	E	N
10	O	R	D	O	N	O	J	■	A	D

Solve de la krucvortenigmo en La Espero n-ro 2/1992

Sten Svenonius
Vendelsfridsgr 4C
21764 Malmö

31

Esperantoförbundet, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm

SEJU

Aŭtuna renkontiĝo de la Nordiaj esperanto-junularoj

Kion ni faros?

Ni invitas ĉefe aktivulojn el la nordiaj landoj por paroli pri kunlaboro en Nordio kaj pri *Kvinpinto*. Krom la laborkunsida parto ni planas havi lingvan aŭ/kaj literaturan rondon, kaj komune festos je sabata vespero.

Kiam kaj kie?

Inter la 2-a kaj 4-a de oktobro 1992 en Gotenburgo. Ni volas komenci frue en la vendredo kaj finos malfrue en la dimanĉo. La sportejo *Tuve Idrottsförening* situas sur la insulo *Hisingen*, transrivere de la urbo Gotenburgo. Iru per buso 34 ĝis la finstacio, de tie ĝi estas facile trovebla. La ejo ofertas diversajn sporteblecojn. Kunportu dormsakon kaj matracon, kaj sportilojn laŭ via sportemo: tablotenisilojn, glitŝuojn, ĵetdiskon, pilkon...

Kiel aliĝi?

La kotizo inkluzivas loĝon kaj manĝojn kaj estas: SEK 300 ĝis la 31-a de aŭgusto 1992 kaj SEK 350 post la 31-a de aŭgusto 1992.

Anoncu vian aliĝon al **Keiko** (adreso sube) kaj antaŭpagu SEK 100 al la poŝtgira konto de SEJU: 51 33 01 - 2.

Pliaj informoj haveblas de: **Inga Johansson**, tel: +46 31 15 57 23, aŭ de: **Keiko Snarberg**, Björcksgatan 31 B, S-416 52 GÖTEBORG, Svedio
Tel: +46 31 19 74 87

Ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu.

[PROVERBO EL LA PROVERBARO DE L L ZAMENHOF, KOMPOSTITA PER LA LITERTIPO PHOTINA]



OMNIBUS: Produktado de libroj, gazetoj kaj reklamiloj en esperanto, sveda kaj aliaj lingvoj; ankaŭ cirilaj literoj. Pli ol tri mil malsamaj litertipoj je dispono.

OMNIBUS · Box 135 · 135 23 Tyresö · Tel. 08-742 83 36 · Fakso 08-712 39 93

Barnens Ö!

La sola inda kulmino de via somero. Partoprenu la tradician, natur-hedonisman junularan renkontiĝon sur

"L' insulo de l' infanoj"
- Barnens Ö!



Adiaŭu la someron en rondo de amikoj. Certigu mensan sanon por la vintura sezono. Senstreĉiĝu en la fundo de nordia naturo. Enspiru aeron de maro kaj ber-graveda arbaro. Elsaŭnu viajn zorgojn kaj lavu ilin for per plonĝo en noktana lagon. Sekiĝu ĉe lignofajro sub pulsanta stelarego.

Tempo:

28-30 de aŭgusto 1992

Kotizoj:

Stokholmanoj	SEK 300
Ne-stokholmanoj	SEK 250
Ne-svedoj	SEK 200

Aliĝo:

Ĝiru la kotizon al la poŝtgira konto de La Ranetoj: 8 88 02-4. Indiku vian nomon. (B.v. aliĝi frue - tio faciligas planadon de manĝoj ktp.) Demandojn respondas Per Aarne, tel: 08/97 47 76.

Kiel atingi?

De la stokholma metrostacio *Tekniska Högskolan* prenu buson 640 al la urbo *Norrstälje* (70-minuta veturo), ŝanĝu al buso 636 al la haltejo *Barnens Ö-Centralbryggan* (ĉ. 50 minutoj).

Notu: Nur kelkaj busoj ĉiutage - informiĝu frue pri la horoj (ekde mezo de aŭgusto ili estos anoncataj en la telefonrespondilo de Lotta Almqvist: 08/724 97 77). La ĉi-jara kabano nomiĝas *Wassbergs minne*, tel: 0176/931 02.

Kion kunporti?

Littolajon aŭ dormosakon, botojn kaj puloveron, muzikilojn, ludojn, vortarojn, esperantajn legindaĵojn, ktp...

Atentu: Ĉi-jare la kabano havas kapaciton de nur 20 feliĉuloj! Kuru, kuru!